// STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1974 5(43)



Dum la amika kunesto kun prof.Stejskal/meze/, prezidanto de Ĉeĥa Packonsilantaro

# VALORA KUNLABORO

## Honor-Insigno de MEM al prezidanto de Ĉeĥa Packonsilantaro

Reciproka kunlaboro kaj apliko de Esperanto en la porpaca aktivado estis la ĉeftemo, kiun praktikis la prezidanto de Ĉeĥa Packonsilantaro /ĈP/, prof.Antonín S t e j s k a l kun la reprezentantoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio la 16an de majo en Brno.

Okaze de la renkontiĝo la prezidanto de la Ĉeĥa MEM-sekcio kaj membro de IK MEM, Oldřich Kníchal, transdonis al la prof.Stejskal Honor-Insignon kaj Diplomon de Mondpaca Esperantista Movado kiel rekonon por lia longjara porpaca laboro. Ĉeestis la propagandfaka gvidanto de ĈP C.Mileř, prez. de EK Brno J.Vondroušek, ties vicprezidanto kaj MEM-peranto d-ro J.Ŝikula kaj estro de la ER ĉe la Maŝinfabrikoj en Brno A.Balaŝ. En la amika atmosfero oni debatis pri diversaj efikoj de Esperanto sur la kampo de la internacia kunlaboro kaj paco.

/daŭrigo sur la 3a pĝ/

# EN LA JUBILEANTA OPAVA

LET 30 OPAVY

Ne ofte okazas, ke la esperantistaj renkontiĝoj efektiviĝu en lokoj, kiuj rememoras sian jubileon. Tian okazon havis la ĉeestintoj de la III-a Esperantista Kultura Festivalo en Opava /5.-8.7./, la urbo festanta ĉi jare sian 750-jariĝon.

Pli ol cent personoj ĉeestis la solenan malfermon en la Uzina Klubo Ostroj.Post la inaŭguraj vortoj de J.Vítek, la prezidanto de ĈEA oni aŭskultis la salutvortojn de reprezentantino de kulturministerio J.Gabrielová, kiu alvokis la esperantistojn al la intima kunlaborado kun la ceteraj sociaj organizaĵoj, pledis por la pli efika organiza laboro kaj sugestis i.a. partoprenon en la solenado de diversaj kultur--jubileoj venontjaraj kiel tiu de S.K.Neuman.

D.Blanke, sekretario de CLE, Berlino, parolis poste pri la unika misio de la IL en la socialisma integriĝo. Alia eksterlanda delegito, Nenko Jonkov, Bulgario, salutis en la nomo de BEA. AE SSS, Bratislava, salutis pere de sia sekretariino s.Mihalová kaj en la nomo de polaj esperantistoj s-ino K.Pienkiwicz. En kultura interprogramo kostumita g e j u n ula grupo de la ER en Opava ĉarmis per popolaj kantoj mikse en E-o kaj ĉeñe, kaj dancoj akompanataj de arĉinstrumenta orkestro. La solenaĵo finiĝis per akcepto de rezolucio al la Ĉeña Packonsilantaro kiu esprimas la solidarecon kun la ĉilia popolo.

La organiza komitato gvidata de ing.V.Koĉvara ebligis eĉ specialajn kunsidojn de la sekcioj MEM kaj IKUE. La unuan sub la gvido de O.Kníchal partoprenis krom la ĈEA-estraro , ankaŭ reprezentantino de CLE R.Schonert, reprezentanto de la bulgara junularo B.Leonov kaj multnombraj delegitoj de l'esp. rondetoj. La kunsido de la ĈEA-estraro pritraktis la temojn "junularo" kaj "agado de la politik-eduka komisiono".La oficiala parto kulminis per akcepto ĉe la urbestro la lastan festivalan tagon.

La kultura programo inkluzivis koncerton de Kantĥoro de Sileziaj Instruistinoj kaj teatran prezentadon far la polaj aktoroj el Varsovio K.Pienkiwicz kaj Z.Dobrzyński, aperintaj en la duakta komedio "proksima nekonato" de A.Scibor-Ryński. La festivalanoj spektis jam vendrede artvesperon je la temo "Ĉeña poezio en Esperanto" en la memordomo de P.Bezruc,kiun preparis V.Koĉvara kaj prezentis membroj de la Silezia Teatro. Krom diversaj promenoj en- kaj eksterurbaj /al la kastelo en Hradec/ okazis je la festivala fino la tradicia ekskurso tuttaga tra Silezio.

Okaze de la festivalo estis eldonitaj specialaj bildkartoj kaj afiŝoj kaj en apudsalono de la UK Ostroj ekspozicieto de kolorbildoj el la tuta mondo ornamis la murojn.Ni esperu, ke al la tradicio, kiu jam enradikiĝis en tiu ĉi regiono, la venontaj jaroj aldonos ankoraŭ pli da verio.

kni/vk

## KOREKTO

En la poemo Paco /2/74, 1-a pĝ/ en la 8a linio maldekstre devis esti "per tiu vort'..." Ni pardonpetas la tradukinton kaj la legantojn.

# Kongreso de AE SSR en Martin

Al la tutlandaj solenaĵoj de la Slovaka Nacia Revolucio kontribuis la slovakaj esperantistoj per okazigo de la 5a jubilea kongreso de AE SSR /12.-14.7/ en Martin kun pli ol 200 partoprenantoj. Por ĈEA salutis la kongresanojn ĝia prezidanto Josef Vítek.

La solenan inaŭguron sabate sekvis omaĝo dum kiu oni metis florkronon al la Monumento de la herooj de la Slovaka Nacia Revolucio. Simile oni honorigis la memoron de la eminentaj forpasintaj esperantistoj J.Barč-Ivan, J.V.Dolinský kaj M.Benka en la Nacia tombejo.

La delegitoj elektis la novan Centran komitaton de AE SSR kun la prezidanto Pavel Rosa. Je la komitata funkcio rezignis pro sia progresinta aĝo d-ro Ľ.Izák.

La kultura programo konsistis el eroj de oratora kaj recita konkursoj, pupteatra prezento fare de la ensemblo el Košice kaj la eroj M.Smyčka, solisto de la Ŝtata operejo en Ústí n.L. Jam vendrede vespere agrabligis la samideanan kuneston ĉe la interkona vespero la Esperanto Kvarteto el Trenčín kun varia internacia programo en E-o.

En amika kongresa atmosfero oni publike ekdeziris ĉe diversaj okazoj, ke bone funkciu kaj plilarĝiĝu komuna agado inter la ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj.

Enkadre de la kongreso okazis la publika kunveno de MEM--sekcio. Ĝin partoprenis ankaŭ la prezidanto de ĈEA J.Vítek kaj ties vicprezidanto D.Kočvara, kiu salutis la kunvenon.

Pri la ĝisnuna dujara aktiveco de la sekcio raportis la prezidantino dr.M.Šaturová, substrekante laborrezultojn , atingitajn kunlabore kun la CK de Nacia Fronto. La kunlaboron kun Slovaka Packonsilantaro resumis d-ro F.Šatura , kiu akcentis la neceson de konkreta porpaca laboro. La ĉeestantoj per manlevo konsentis kun la propono d d-rino M. Šaturová, ke la nova prezidanto de la sekcio fariĝu d-ro F. Šatura.

Fine oni honorigis per unuminuta silento la memoron de la forpasinta ĝen.sekretario de MEM, Tomáš Balda.

lk/ok

---

VALORA KUNLABORO /daŭrigo de la 1-a paĝo/

Por pliintensigi la ambaŭflankajn kontaktojn prof. Stejskal proponis akcepti tri funkciulojn de ĈEA en Ĉeĥan Packonsilantaron, kiu estas supera organo de la nacia pacmovado.

Du reprezentantoj de ĈEA partoprenis la saman tagon en la ĵurio de la tutŝtata infana desegnaĵ-konkurso "La infanoj, paco kaj arto".

La gazetaro raportis pri la renkontiĝo.

La 5an de junio transdonis en Prago la reprezentantoj de la Ĉeha MEM-sekcio O.Kníchal kaj inĝ.F.Sviták Honor-Insignon de MEM al la prezidantino de la Mezbohemia Regiona Packonsilantaro, Emilie F i š e r o v á . Ĝi okazis antaŭ la fermo de la region-kadra konkurso " La infanoj,paco kaj arto". Antaŭ la multnombra publiko aprezis la pozitivan kontribuon de la MEM-sekcio reprezentanto de ĈP F.Miňovský.

# INTERNACIA LINGVO KAJ GEOLOGIO

## REZOLUCIO DE LA VARSOVIA SIMPOZIO

La geologoj, kiuj kunvenis en Varsovio la 7-an ĝis 9-an de majo 1974 kaj partoprenis la simpozion INTERNACIA LINGVO KAJ GEOLOGIO, por prelegi kaj debati en Esperanto pri siaj fakaj problemoj, konstatas :

1.ke ilian senprecedencan renkonton en la naskiĝurbo de E. ebligis eksterordinara aktivemo kaj oferemo de la polaj gekolegoj, kiuj sukcesis akiri aŭspicion kaj ĉiuflankan subtenon de Instituto Geologia, precipe de ties direktoro;

2.ke la prezentitaj 19 referatoj kaj komunikaĵoj unuavice liveris kompetentan kaj ĝisdatan materialon pri sukcesoj de la pola geologio, ne preterlasinte aliajn landojn, eĉ pure faklingvajn problemojn kaj samtempe demonstrinte kun nepra konvinkiveco, ke la Internacia Lingvo taŭgas por esti uzata en la terscienca fakoj tutmonde;

3.ke la simpozia materialo aperos en 1976 kiel la 3-a volumo de GEOLOGIO INTERNACIA, eldonota de Instituto Geologia en Varsovio kaj redaktita de Geologia Sekcio de ISAE;

4.ke la ĵuse nomita sekcio elektis, la 9-an de majo 1974, la novan estraron, kiu entreprenos efikajn paŝojn por certigi la jam akiritan pozicion de Esperanto en la geologiaj sciencoj eĉ por penetrigi ĉi lingvon en pluajn instituciojn kaj fakrevuojn diverslande;

5.ke la partoprenantoj vidas urĝan neceson, ke estu eldonita vortaro /jam ekzistanta forme de manuskripto/ por fiksi la uzadon de fundamentaj geologiaj terminoj en Esperanto;

La samaj geologoj, partoprenintaj de la simpozio, rekomendas al siaj gekolegoj en la tuta mondo pli vaste ekuzi Esperanton, por ke faciligu ilia scienca kunlaboro, peze malhelpata pro la lingvaj baroj. Aplikante la facilan, precizan kaj neŭtralan Internacian Lingvon, ili ŝparos multe da energio , tempo, mono kaj povos pli efike dediĉi sin al la terscienca esplorado.

### NOVA ESTRARO DE GS-ISAE

Prezidanto: RNDr.V.Zázvorka CSc.,direktoro de Nacia Muzeo en Prago,Ĉeĥoslovakio; honora prezidanto: A.Cailleux,prof. pri sedimentologio kaj geomorfologio ĉe l´universitatoj Sorbonne kaj Laval, direktoro de scienc-esploroj ĉe Centro d´Études Nordiques en Kvebeko; sekretario: Dr.S.Skompski, ĉefo de Sekcio por Detala Mapado en Instituto Geologia en Varsovio,Pollando; lingva konsilanto kaj redaktoro de GEOLOGIO INTERNACIA:RNDr.J. Kavka CSc.,ĝenerala sekretario de ISAE,Prago, Ĉeĥoslovakio; kunlaboranto por informi neesperantistajn instituciojn :Dr.E. Dudich, ĉefo de Informa Servo en Ŝtata Geologia Instituto de Hungario, Budapeŝto; kunlaboranto por informi esperantistan publikon: J.Gorol, teknikisto-geologo, Katowice, Pollando.

— —

SCIENCA REVUO, 2 kompletaj volumoj /1972,1973/ estas haveblaj en limigita kvanto por tre avantaĝa prezo /unu volumo po 85,-Kčs/ ĉe la ĝenerala sekretario de ISAE, RNDr.Jos.Kavka,CSc.,Lužná 7 - Vokovice, 160 00 PRAHA 6.

## SIMPOZIAJ EKSKURSOJ ...

Okaze de la simpozio ILG en Varsovio realiĝis du geologiaj ekskursoj: la unua estis gvidata de d-ro Skompski, kiu sub la temo "Sedimentoj kaj formoj de pleistoceno en la centra Pollando" montris al la partoprenantoj diversajn aperlokojn sur la teritorio de Plocka baseno, 200 km nordokcidente de Varsovio. Li surprizis ilin per eksterordinare demonstrivaj ekz. pri glaciega aktivado en kvaternaro.

La dua estis gvidata de d-ro Kowalczewski tra la regiono de Santakruca montaro. La nomita regiona esploristo demonstris al la partoprenantoj la tiean stratigrafion ekde kabrio ĝis mezozoiko kun vico da trovlokoj abundantaj pri fosilioj. Krome li ĉarmis ilin per siaj profundaj konoj pri la regiona historio.

La unua ekskurso okazis antaŭ la simpoziaj debatoj, la 6-an de majo, dum malvarma, iom pluva vetero. La dua okazis post la simpozio, la 10-an de majo, dum agrabla sunvetero.

Por ambaŭ ekskursoj, la direktoro de IG, prof. R. Osika, disponigis luksan teren-aŭtomobilon, ekipitan per geolog. ilaro.

J. Kavka

## AKTIVE EN BOR

La Pacdefenda Esperantista Rondeto arangis la 25an de majo en la urbodomo de Bor kunvenon omaĝe al la liberiĝa jubileo de CSSR. La aranĝon aŭspiciis la Loka Nacia Komitato kaj Nacia Fronto. Pri sia kontraŭfaŝisma agado rememor-parolis k-do Friedl, la EK-ano kaj la plej aĝa partoprenanto de la karavano el Karl-Marx-Stadt/GDR/, la esperantista ĝemel-urbo de Bor.

La saman tagon okazis danc-vespero en la kastelo Velké Dvorce apud Bor, kiun partoprenis ankaŭ 17 esperantistoj el Karl-Marx-Stadt. La 29-an de majo oni projekciis en la kinejo de Bor la esperantlingvajn propagandfilmojn pri Fiat.




## VIZITOJ EKSTERLANDE

La prezidanto de ĈEA J. Vítek kaj sekretario Z. Křimský, reprezentis la asocion ĉe la 2-a tutlanda konferenco de la esperantistoj de GDR en Berlino. Estis priparolita reciproka kunlaboro de ĈEA kaj CLR kaj interkonsentitaj pli intimaj rilatoj inter la regionoj kaj urboj Karl-Marx-Stadt kaj Ústí n. Labem, kie jam tradicie kontaktiĝas esp. de ambaŭ landoj. Pri la oficiala ĝemeliĝo-propono farita de CEA decidos la superaj aŭtoritatoj.



La 25 an hungarlandan Esp.-Kongreson en Szolnok/21.-23.6/ partoprenis por ĈEA D. Kočvara kaj O. Kníchal. Kun la ceteraj eksterlandaj delegitoj el GDR, Pollando, Bulgario ili transdonis la mesaĝon de ĈEA kaj de ties MEM-sekcio, kaj estis akceptitaj ĉe la urbestro B. Kukri.

La kongreson partoprenis pli ol 400 esperantistoj, el ili preskaŭ unu triono venis el eksterlando.

## RENKONTIĜO APUD PARDUBICE

Al la 4a renkontiĝo sur la monto Kunětická hora /25.-26.5/ venis entute 110 esperantistoj el 30 ĉs. urboj, el ili du komitatanoj de ĈEA, kaj 10 eksterlandaj gastoj. La ĉeestantoj kontentis pri muzika kaj teatra prezentadoj kaj admiris la sorĉistan lerton de L. Rýznar el Svitavy. La vespera tendarfajro kunvenigis oninen Brozany. Dimanĉe okazis trarigardo de la antikva parto de Pardubuce.

jr/lk

# MLADÍ ESPERANTISTÉ JDOU DO TOHO

20. července se sešli členové Komise ČES pro spolupráci s mládeží se zástupcem předsednictva ČES Z.Křimským na poradě o konkrétních opatřeních, jak znovuoživit a podstatně zvýraznit činnost esperantské mládeže. Účastníci porady shodně konstatovali, že dosavadní praxe, kdy se esperanto pěstovalo jako "koníček" a jen pro samotné esperantisty, se již přežila, a mohla by vést k izolaci a stagnaci celého hnutí.

Jednou z nových metod práce mezi mladými esperantisty by mělo být soustavné a promyšlené vedení mladých adeptů k extenzivní propagační činnosti. Jde především o to, aby se zapojili do spolupráce se SSM a PO, aby využívali každého většího setkání neesperantské mládeže k popularizaci mezinárodního jazyka.

Je třeba, jak se to již podařilo v Aši a jak to chtějí udělat také v Liberci, nabídnout svoji esperantskou odbornost při zakládání Interklubů mladých a dohodnout s okresními či městskými výbory SSM vedení jejich esp. sekcí. Přitom se předpokládá, že členové ČES budou zároveň členy SSM. Rovněž by bylo vhodné nabídnout spolupráci pionýrským domům a školám při vedení oddílů či jazykových kursů.

Nyní je nutné, aby každý klub nebo místní skupina, kde jsou mladí lidé, vybraly alespoň jednoho aktivistu, s kterým komise naváže kontakt. Na setkání v Mělníku, koncem října tr., se počítá s pracovním aktivem mladých esperantistů, z něhož by měly vzejít konkrétní úkoly. Zájemci však mohou přijet již na zářijový seminář na Černou Louži.

Komise očekává vaše přihlášky ke spolupráci ! Zasílejte je na adresu svazu.
Josef V í t e k, j.

## NOVÁ KOMISE Č E S

Při Českém esperantském svazu se připravuje založení komise pro teorii a dějiny mezinárodního jazyka, která bude spolupracovat s obdobnými komisemi v socialsitických zemích při zpracovávání marxisticko-leninské teorie mezinárodního jazyka / v jeho sociálních, historických, filologických a dalších aspektech/. Prosíme vážné zájemce, aby se přihlásili u dr.Jaromíra Jermáře CSc., Jabloňová 43,100 00, Praha 10.

## PER ESPERANTO POR LA MONDPACO

La sindikata Klubo en la uzino Škoda PLZEŇ kaj ER, la loka grupo de ĈEA, aranĝos de la 20-a ĝis la 27-a de septembro ĉijara la ekspozicion "Per Esperanto por la mondpaco", okaze de la 70jaekzistado de la rondeto kaj honore al la pacjubilea jaro. La ekspozicio situos en la uzina klubo de Škoda /Beseda, Parko de V. Kopecký 13/.

AMIKECO TRANS LIMOJ. La 8an de junio okazis en Karl-Marx-Stadt, GDR, renkontiĝo de 27 okcidentbohemaj esperantistoj kun la germanaj samideanoj, dum kiu oni priparolis la pli intiman reciprokan kunlaboron. tu/pĉ

LA ESPERANTISTOJ EN BERLINO renkontiĝas ĉiumerkrede je la 19a horo en Klub 72, 1055, Berlin, Prenzlaŭer Alle 217. Ĝi atingeblas per S-Bahn al Prenz.Allee, de tie per tramo 3 staciojn direkte al la Aleksandro-placo.

LISTO DE RADIOAMATORAJ STACIOJ el la tuta mondo disponebla por interesatoj el ĈSSR ĉe la asocio, Jilská 10, Praha 1.

# Rondeta vivo



ČESKÁ TŘEBOVÁ - Esperanto - -Laborrondo de Schwerin, GDR, E-societo en Vidin, Bulgario, EK "Amikeco" en Č.Třebová, interkonsentiĝis en Schwerin dum majo pri la kunlaboro, i.a. ankaŭ pri la reciproka konatiĝo pri siaj distriktoj kaj urboj, pri la hom-medio, kluba vivo.
Ĉiuj partoprenantoj decidis subteni personajn kontaktojn.

HAVLÍČKŮV BROD - Dank´ al la iniciatemo de la rondet - gvidanto J.Žák la ĉi tiea Uzina Klubo de ČSD invitis en majo esperantistojn Emmrich/GDR/ kaj Esperjesi/Hungario/kiel gastojn al Havl.Brod. Okaze estis aranĝitaj du kunvenoj kun fervojistoj neesperantistoj/ unu publika , la dua kun la UK-estraro/. La gastoj ekskursis al Lipnice, Humpolec kaj Prage. /eto/

HRADEC KRÁLOVÉ - La klubo kaj la junularo aranĝos letervesperon la unuan de oktobro. Bv. sendi koresp. al Z.Matyková, 500 02 Hr. Králové II., Gebauerova 1065.
La 28an de majo Z.Hršel el Brno parolis pri kolektado de ilustritaj poŝtkartoj./Kio estas filokartio?/.

LIBEREC - Kunlaboron ĉe popularigo de la ĉs.vitraĵ-industrio proponis al la eksterlanda komerca entrepreno Skloexport en Liberec la loka EK. Per sia letero de la 13a junio la nomita entrepreno respondis pozitive kaj bonvenigis la proponatajn eblecojn koncerne tradukadon de konvenaj prospektoj en E-on.

PŘEROV - La lokaj esperantistoj partoprenadis en la konkurso de la Pola Radio, Esp.fako, el kio rezultis ankaŭ kelkaj premioj al la LG-anoj. Pri la rondeta aktiveco aperis lastjare 6 artikolojn en la gazeto " Přerovský strojař " kaj plenumiĝis du disaŭdigoj en la uzina radio. Al letervespero de la LG venis 1 2 0 sendaĵoj. El eksterlano estas ankaŭ sep leteroj al la loka nacia komitato, aprezantaj la propagandan broŝuron pri l' Urbo.
Por informi pri sia varia aktiveco la esperantistoj en Přerov disponas pri unu montro-fenestro en loka magazeno kaj unu montro-ŝranko.

PŘÍBOR - La 30an kaj 31an de marto oni havis ekspozicion de E-libro : preskaŭ 200 diversaj publikaĵoj estis elmontritaj, inter ili ankaŭ raraĵoj, kiel Diverskolora bukedeto de Lorenc, Korano kaj la unua lernolibro de E-o, kiun uzadis la laboristoj en 1897.

ZNOJMO - EK ĉe Kleriga Societo aranĝis la 14an de jun. amuzvesperon kun konkursoj - ludoj kaj kantoj en E-o. Partoprenis ankaŭ gejunuloj - la frekventantoj de la aŭtuna E. kurso.

## NI LEGIS...

Krom pluraj informoj k.sciigoj en diversaj gazetoj, aperis 4.5. tutpaĝa artikolo "La lingvo de interkompreniĝo kaj paco" en la distrikta partia organo Nová Svoboda eldonata en Ostrava.

La regula eldonserio KARAVANA, Prago, publikigis en sia maja n-ro sciencfikcian rakonton "Neĝponto" /ĉeĥe Sněhový most/ de soveta verkistino V. Žuravleva, kie multloke aperadas konversacio en E-o.

Monata gazeto MÍR, organo de ĈS.Packomitato en Prago enŝovigas regulan rubrikon de la Cs.MEM-sekcio.



## VESPEROJ KUN VERKISTOJ

Antaŭ tri jaroj la Riga Esperanto-Klubo komencis aranĝi literaturajn vesperojn en la Domo de Instruistoj kaj renkontiĝojn kun poetoj en la Urba Fremdlingva Biblioteko, por la neesperantista publiko.

Afiŝoj, anoncoj en ĵurnaloj, disaŭdiĝoj pere de radio popularigas ne nur la aranĝojn mem, sed ankaŭ la Internacian Lingvon. La vesperoj ĝenerale estas dediĉataj al la verko de unu aŭ du poetoj. En la Esperanta parto la E-poetino-tradukistino E.Lippe prezentas la tradukitajn versaĵojn de la koncerna poeto. La parton en la latva lingvo plejparte plenumas Meritplena aktorino de Latva SSR, Alma Abele. La aranĝo finiĝas per koncerto.

Kortuŝa estis nia renkontiĝo kun la elstara latva verkisto Zanis Griva, prezidanto de Latva Pacdefenda Komitato, kiu lernis E-on en la nazia koncentrejo en Francio.

Antaŭnelonge estis niaj gastoj, geverkistoj E.Pluksa kaj Karlis Kraujins, ambaŭ esperantistoj. K.Kraujins festis la 11-an de junio sian 95-an naskiĝtagon. Li estas la plej maljuna latva verkisto kaj la plej malnova latva esperantisto.

Tiuj ĉi aranĝoj vigligis nian kunlaboron kun la latvaj literaturistoj, vekis ilian intereson pri Esperanto, kaj samtempe multe helpis popularigi inter la loĝantaro de nia ĉefurbo la Internacian Lingvon.

Mirdza Burgmeister, Riga

☆ ☆

## Esperanta-rusa vortaro

/Esperantsko-russkij slovar/. Kompilis doktoro de filologiaj sciencoj E.A.Bokarev. Kun aldono de mallonga skizo pri Esperanta gramatiko. Eldonejo Soveta Enciklopedio Moskvo 1974 488 pĝ., prezo 93 kopekoj.

Prof.Bokarev notas en la antaŭparolo, ke simila vortaro aperas en Sovetio post kelke da jardekoj. Kiel bazo por ĝi servis kelkaj diversnaciaj verkoj, inter kiuj li menciis ankaŭ tiun de R. Hromada. La vortaro de Bokarev klopodas esti maksimume kompleta, enhavante ĉ.26 mil vortojn, el kiuj multaj ne estas kutime troveblaj en la Esp. literaturo.

Admirinda verko de la renoma soveta filologo kaj la mondfama interlingvisto meritas plenan atenton de la fakuloj kaj de ĉiuj esperantistoj. Aĉetebla en: Zahraniční kniha, Praha, Vodičkova ul. /kni/

## GASTO EL NOVA GVINEO

Dum la lasta aprila semajno vizitis sian amikon Milan Neuwirth en Poruba esperantisto Johano Wilkki el Finnlando, vivanta jam kelkajn jarojn en Nova Gvineo kaj alportis multe da koloraj diapozitivoj el tiu lando, samkiel el Figio kaj Novzelando. Li prelegis en la junpionira Esper.rondeto en Mar.Hory dum la prilingva konkurado de la rondeto kun tiu en Havířov. En Poruba li prelegis al laboruloj de la Pensiula domo kaj en la rondeto de la Kulturdomo de ministoj.

La prelegoj de J.Wilkki vekis grandan atenton kaj estis ege tre varme akceptitaj.

La konversaciaj vesperoj en E-o, publike anoncataj, plu okazas ĉiumonate en la Kulturdomo de ministoj. ASt.

## Jan Neruda EL KOSMAJ KANTOJ

Kiam la planedoj falos sur la sunon
kaj de frosto l'suno diseriĝos el la nuno,
ĝis tiuj eroj per incit'de l'morto
trovos en sovaĝ-elipso sian sorton,

kiam funebra procesio trista,
terurplena, sena je la vivodonoj
trakuregos tra l'universo dista
trans milion-milionojn da epok-atomoj,

ĝis fine ie en kosmoanguleto
post longega migro ĝi ekhaltos
kaj polveret'el estintaj niaj mondoj
tie en novan ĥaosfajron re-ensaltos,

ĝis en haoso tiu batal'flamega,
batal'titana okazos tujmove
kaj el flamegoj ardaj kiam nova mond'
kvazaŭ fenikso sorĉa ekstaros denove,

kiam sur mond'la frukta kaj novega
cedos la batalo antaŭ vivojuno
kaj herbej'fariĝos de koloroj nura rid',
kaj arbetar'pleniĝos de amdolĉa zumo,

ĝis en mondo tiu foje ekburĝonos
kreaĵ'kun la kor', kun amdolĉa la angoro,
tiam eble refoje mia malgranda la atom'
tie per nova kosma kant' eksonos.

Elĉeĥigis Josef Černý

La 9-an de julio pasis 140 jaroj ekde la naskiĝo de Jan N e r u d a /1834 -1891/ ĉeĥa ĵurnalisto,verkisto, pri kiu Julius Fučík diris:"Li estas nia plej granda poeto kaj krome vidanta malproksimen trans niajn kapojn en la estontecon".

## KRONIKO - - -

Forpasis en la aĝo de 77 jaroj Stanislav Ch a l o u p k a en Ostrava-Vítkovice.La forpasinton adiaŭis la 7an de majo A.Staňura.

Post grava malsano mortis la 14an de majo en Hradec Králové Rudolf G o t t s t e i n , aĝa 74 j.

Roman B y s t ř i c k ý , sekretario de EK Cheb forlasis niajn vicojn en marto ĉijare, en la aĝo de 80 jaroj.

Dr.ing.Jaromír Š i k u l a - 50 jara. Vicprezidanto k MEM-peranto de LG en BRNO d-ro J Šikula festis la 29an de majo sian 50 jariĝon. Esperantisto ekde 1949,membro de la iama ČSEK, popularigas E-on precipe en sia faklaboro kiel botanikisto, altlerneja pedagogo en Brno, aŭtoro de kelkaj popularsciencaj publikaĵoj.

# FERVOJISTOJ EN TARRAGONA

IFEF elektis por sia 26a kongreso /11.-17.5.1974/ la hispanan mediteranean urbon Tarragona/85 mil log./. La kongreson - sub aŭspicio de FISAIC /Internacia arta kaj kultura fervojista federacio/- partoprenis 648 personoj el 17 landoj. La Fervojistan Sekcion de ĈEA reprezentis ĝia prezidanto J.Piŝtora. Oficiale salutparolis la urbestro s-ro R.Vilar Guix.La IFEF-prezidanto J.Giessner en sia enhavoriĉa parolado skizis la perspektivon de la internacia lingvo kaj pledis por la vera paco en la tuta mondo per Esperanto.

Dimanĉnokte, antaŭ la bela renesancstila urbodomo, okazis unika Folklora vespero kun kelkaj dancgrupoj,gimnastikistoj, kantĥoro kaj junaj atletoj. Dum la Arta vespero Bulgara Esp. Teatro el Sofio prezentis la 3-aktan komedion "La rozoj" far Aldo de Benedetti.

Sur la faka tereno menciindas la prelego " Evoluado de la RENFE dum la lasta jardeko" prezentita de J.Cerezo. Temis pri la dekjarplano por modernigo de la hispana fervoja reto.

La junularo, kies preferata kongresejo estis la proksima marbordo, kunestadis ankaŭ por pikniko, futbalmatĉo inter CF Tarragona kaj la IFEF-teamo, ludoj kaj teatraĵoj,kiujn sekvis la Junulara balo.

En la plenkunsido kaj du komitatkunsidoj unuanime reelektiĝis al IFEF d-ro I.Bácskai el Hungario /ĉe UEA/. Raporto de la ĉefkomitatano K.Gretert substrekis la konstruan laboron de la IFEF-parlamento. Resumon pri la raportoj de la landaj asocioj laŭtlegis O.Walder. La komisionoj por fakprelegoj, terminaroj kaj junularo raportis pri sia dumjara laboro kaj pri la dumkongresaj kunsidoj.Elektiĝis kiel sekretario de la fakprelega komisiono O.Roosemann,FRG, kiel sekr. de la terminara komisiono J.Ladjevic,Jugoslavio.

Kun maksimuma nombro da voĉoj oni elektis la estraron : prezidanto J.Giessner; vicprez.W.v.Leewen; sekretariino E.Kruse; kasisto H.Hauge kaj redaktoro G.Dolaquaiso. Gvidantino de la Junulara sekcio fariĝis M.Merlani. Kiel kongresloko 1975 estis fiksita Villach,Aŭstrio kaj por 1976 Skelleftea,Svedio.

Estis anoncite, ke dum la 59a UK en Hamburgo okazos la fervojista tago. La DB-direkcio komisios aron da spertuloj por servi al la kongresanoj per prifervojaj informoj.

La publika informado pri la kongreso okazis antaŭ la aranĝo pere de mil afiŝoj en iuj gravaj stacidomoj. La LKK estis 4-foje vokita por radio-intervjuo kaj la du lokaj gazetoj dediĉis tutan paĝon al la kongreso. Dum la kunsidoj aperis gazetaj artikoloj kaj disaŭdiĝis radio-intervjuo.

La bela ĉarma regiono logis al baniĝo kaj ekskursado. La unua veturo celis al Villafranca des Penades kaj Snt Paul de Ordal por inaŭguro de la riĉenhava, novkonstruita Esperanto--Muzeo kun posta regalo far la komunumo. La dua,aŭtobusa ekskurso, kondukis al Sitges kaj Villanuova y Goltru, kie interesa vaporlokomotiva ekspozicio estis instalita. La tria ekskurso kondukis suden, laŭlonge de la marbordo, al la urbo Peñiskola.

J.Piŝtora



# INFORMACE ze SEKRETARIÁTU ČES

VŠEM SDĚLUJEME RADOSTNOU ZPRÁVU, že se nám konečně podařilo instalovat v sekretariátu telefon. Můžete nás volat v naléhavých případech na č. 220 262 mezi 7-15 hod., kromě soboty a neděle.

OČEKÁVANÉ SAMOLEPKY /viz ukázka/ již vyšly. Cena za aršík s českým textem je 6 Kčs /28 ks/ s esp. textem 5 Kčs /24 ks/. Za jednorázovou objednávku více než 25 archů od obou druhů poskytneme slevu 10%. O samolepky je zájem i v Jugoslávii, protože český text je velmi srozumitelný. Věříme, že i naši slovenští přátelé si objednají. Věnujete -li samolepky svým přátelům v zahraničí, bude to jen posílení naší propagační práce.




SLOSOVATELNÉ KNIŽNÍ POUKÁZKY jsou dosud v dostatečném množství. Cen je o polovinu více než loni a jejich celková hodnota je podstatně vyšší, přičemž nikdo nemůže prohrát. Za odběr a prodej více než 10 losů až desetiprocentní slevu !

Na skladě jsou i nově vydané mozaikové pohlednice Prahy a nové DOPISNÍ PAPÍRY s tříbarevným tiskem a s obálkami světového formátu 22 x 11 cm. Na papíře i obálce je čs. vlaječka s esp. hvězdičkou a pod ní nápis: ESPERANTO-LINGVO INTERNACIA. Odhadná cena 5,- Kčs za 10 kompletů.

PŘEDPLATITELŮM Heroldo de E-o sdělujeme, že z neznámých důvodů jsme nedostali č. 9. Redakce na naši reklamaci dosud neodpověděla.

ZÁJEMCŮM o odznak čs. esperantistů : podařilo se nám sjednat dodávku na III.Q.1974. Podle dosavadních zkušeností předpokládáme, že se uskuteční spíše koncem termínu.





## POZOR NA KALENDÁŘ !

Do oficiálního kalendáře akcí pořádaných ČES v roce 1975 budou zařazeny pouze ty, které organizátoři včas ohlásí ! Pořadatelé jsou povinni vyplnit příslušný formulář /vyjde jako příloha Informací č. 21/ a po potvrzení příslušným odborem NV jej zaslat nejpozději do konce září vedoucímu turistické komise ČES J.V.Ottovi, 789 64 Raškov 95 okr. Šumperk. Na pozdější reklamace nebude brán zřetel.

DOBROVOLNÉ DARY SVAZU /březen-červen/ : T.Kilián - 1000, M.Baldová - 1000, S.Dyba -15, J.Adamec-15, Struminský-20, Štifter-20, Žirovnická-15, L.Fritsch-60, Böhm-15, V.Kuborčák-15, R.Majtán-15, Martinec-15, J.Drlík-20, S.Zedníková-50, Josef Pavel-15, J.Molnár-15, Majerová-45, M.Koutná-15, J.Bolohovská-15, M.Pelcl-15, M.Studecký-15, J.Petrlík-15, J.Werner-336, M.Černá-15, A.Zmeškal-90, M.Kaňák-15, G.Heczko-100, Štefanec-15, B.Novotný-10, J.Laube-25, K.Kraft-50, M.Lorková-70, J.Douček-20. Všem dárcům dík !

V SOUČASNÉ DOBĚ SE VYSKYTLY ZNAČNÉ POTÍŽE PŘI TISKU SVAZOVÉHO ČASOPISU. PROSÍME NALÉHAVĚ VŠECHNY EK a MS, ABY INFORMOVALY SVAZ O MOŽNOSTECH ZAJISTIT POTŘEBNÉ KAPACITY VE SVÝCH MÍSTECH

## Krucenigmo de A. Staňura



HORIZONTALE : A. Unua parto de sekretaĵo /verko de ĉeĥa aŭtoro,1890-1938/.- B.Mallongigo de Sovetrespublika Esperanto--Unio; voj'kun du vicoj da arboj; najl'por kunigi du pecojn de lado.- C.Ŝovi langon sur io; fin'de ŝakludo;titol'de kalifoj.- D.En granda distanco super la tero; membro; devenanta de fiera kortbirdo.- E. Dua parto de la sekretaĵo.-F . Kliniko; fortika herb; parto de fervojlinio.- G.Mez'de rado; valora metalo.

VERTIKALE : 1. Farita el metaltabulo.- 2. Rilata al kemia elemento Se.- 3. Prefikso por komenciĝo de ago; ordonita labor'.- 4. Dungi; granda poem'.- 5. Estinta; duona nombro de Fundamentaj reguloj.- 6. Neĝkolora.- 7. Plektaĵo kun grandaj interspacoj; signo de radono.- 8. Nedifinita pronomo; frukto de ĝardenarbo. -9. Per romaj ciferoj 999; aĵ'. -10. Maldika etenditaĵo. - 11.Nomo de monato.

## Korespondi deziras

SOVETUNIO - Por si kaj por siaj belaj klubaninoj dez.amasajn korespondproponojn D.KOLKER /S-Kolcevaja 20-149,330058 Zaporoĵje/, kiu samtempe interŝanĝas filatelajn seriojn k.blokojn pri kosmo kaj pentroarto.

16-jaruloj S.MIŜCENKO, Malinovskogo 4-49,330059 kaj G.STRIJEVSKIJ, Sovhoznaja 20-77 , 330059,ambaŭ Zaporoĵje.

V.OLENEC, 22j.laboristo,Bilkina 8-2, Zaporoĵje 330034.

A.K.DOVBIS, 31j. 245110 - Ŝostka, Sumskoj obl.,Marata 41--57,Ukraino.

F.BATRAK, 27j. 245110 Ŝostka,Sumskoj obl., ul.Privokzalna 13-10 kaj V.GROMOV, 25j. 245110 Ŝostka,Sumskoj obl.,ul.Pri - vokzalnaja 11-12.

Interŝanĝe por esperantaĵoj sendos n-ron de monata revuo en la jida lingvo H.L.BRANZBURG, 188260,Luga, Leningrada regiono,str.Gornaja n-ro 13/4.